


LA DEKSEPA



Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII^e Arr^t
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII^e Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Notre Dîner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu
les Mercredis 3 Mai et 7 Juin 1911 prochain, au « Café
de la Gare », 6, place Pereire, à 8 heures du soir très pré-
cises. — Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

Conférences

faites au siège même de la Section, 6, Place Pereire.

- 3 Mai. — M. Poublanc : Laŭhazarda temo.
- 10 Mai. — M. H. de Coppet : La Corse pittoresque (avec projections).
- 17 Mai. — M. Valton : La Tunisie (avec projections).
- 24 Mai. — M. Lhermitte : Kia karaktero, tia skribmaniero (kun lumbildoj).
- 31 Mai. — M. Michel Romano : Pri misteroj en Turklando.
- 7 Juin. — M. Bollack : Vosges et Alsace (avec projections).

NIA LASTA VESPERMANĜO

La 5-an de Aprilo, nia lasta vespermanĝo, estis tre gaja kaj meritas specialan pritrakton pro la grava surprizo, kiun mi havis de la deserto.

Tiuj el niaj samideanoj, kiuj ĉeestis la kongreson de Dresdeno, certe memoros, ke revenante vagonare, en ĉiuj fakoj, estis aŭdata stranga rekantaĵo, kies vortoj estis :

Landorium estas fis'!

Ĉiu, kiu demandis klarigojn al sia najbaro pri la elsajno de tiu speciala fiŝo, neniam ricevis kontentigan respondon, ĉar, kun la montra fingro sur la buŝo kaj misterplena mieno, tiu ĉi respondis al li tute mallaŭte en la orelojn : « Estas fis'! »

Vi komprenas, ke en tiuj kondiĉoj, jam de longe, la sciivolemo estis treege ekscitita pri tiu fiŝo.

Ĉar en Franclando, estas kutime, ke la unuan de Aprilo oni donacu inter si artefaritajn fiŝojn kun internajoj plenigitaj je ĉiuspecaj serĉobjektoj, pensu, kian sukceson havis nia kara sekciانو, Lhermitte, kiam li alportis sur telero, fiŝon laŭ la formo neniam antaŭe vidita, kiu malfermis larĝegan buŝegon kaj sur kies fundo oni povis legi tiujn magiajn vortojn . . . :

Mi estas Landorium !!

Tiu fiŝo, mirinde elpensita, kun strabaj nigraj okuloj, kun verda stelo ĉevale videbla sur la supera parto de l'buŝo, kun skvamoj ĉiukoloraj kaj strangaj naĝiloj, estis akceptita kun bruemaj aklamadoj tiom pli, ke nia sekciانو, kies lertecon ni ĉiuj konas, ne havis modelon por gvidi sian inspiron.


En ĝia internajo ne troviĝis « Jonas'o », sed surprizo por la prezidanto de la Sekcio. Efektive, mi eltiris el la ventro de tiu monstrulo, ravan paperpremilon el onikso, sur kies mezo, bronza artoplana medalo de Aŭgusto Maillard, prezentigis antaŭ la okuloj.

Ĝi figuris la sciencan kun malfermita libro sur la genuoj, kiu montras al sia filo staranta apud si la radiojn de la verda stelo lumigantan la mondon.

Karaj sekciانو, farante al mi tiun belegan donacon, vi volis festi la revenon, meze de vi, de via prezidanto post dolora malsano, kiu daŭris du monatojn : mi neniam sufiĉe dankos vin ĉiujn pro via kortuŝanta amikesprimo kontraŭ

mi. Vi scias, ke vi okupas grandan lokon en mia koro, unue, ĉar preskaŭ ĉiuj, vi estas miaj edukatoj en Esperanto, kaj precipe ĉar vi daurigis praktiki, senescepte kaj fidele tiun interfratigon, kiu estas la sola bazo de firma reciproka amikeco. Al vi ĉiuj denove tutkoran dankon!

*Kara verda stelo, simbolo de l'amo
Fajre brilu nokte, gvidante nin supre,
Sekvu niajn pasosjn, emblemo de l'devo
Firmu nian kredon, elfidos cin nepre.*



AVIADO SUKCESIGOS ESPERANTON

En la lasta numero de la « Dek-Sepa », mi priparolis kelkajn aviadajn heroaĵojn, kiuj meritis altiri la atenton de la esperantistoj: nun, mi ekzamenos ĝis kigrade, ni, propagandistoj de la plej grava bonfaro en la homaro, ni devas ĝoji pri tiaj rezultatoj.

Jam, en niaj tagoj, la vojaĝoj de urbo al urbo estas okazintaĵoj preskaŭ ĉiutagaj; post tri monatoj, la aviada konkurso de nia pariza gazeto « Le Journal » (Paris, Liège, Utrecht, Bruxelles, London, Paris), montros al la mondo miregata, ke la landlimoj ne ekzistas plu por la aviadistoj, kaj ke la scienco neniigis la distancojn inter eŭropaj popoloj dank' al siaj homaj birdoj.

Proksiman jaron, oni transflugos de kontinento al alia, kaj tiam la diverseco de la idiomoj terure malhelpos la aviadistojn.

Oni ne devas forgesi, ke sur la tuta mondo estas parolataj ĉirkaŭ mil malsamaj lingvoj aŭ idiomoj. Estas do necesegge, ke apud la mirindaj progresoj efektivigitaj en la materiaj transportiloj inter la popoloj, okazu korespondaj progresoj en la intelektaj komunikiloj.

Nia kara Esperanto, vivanta lingvo, kiu postvivis jam 6 kongresojn, kiu montris sufiĉege, kiel perfekte ĝi taŭgas por ĉiuj rimedoj, ricevos neesperitan antaŭenpuson dank' al la senĉesaj progresoj de la aviada scienco.

Efektive, niaj morgaŭaj aerflugiloj facile veturos je la rapideco de 200 kilometroj pohore kaj eĉ pli. Ni vojaĝos per « aerobusoj » kun tiom da rapideco, kiom da senriskeco.

Por ke la aviadistoj trovu facile la vojon sekvotan, oni

jam konstatis, ke Esperanto multe helpas la aerajn vojaĝojn per grandegaj surteraj rekoniloj kun esperantaj klarigoj komprenotaj de ciulandaj aervojaĝistoj.

Kompreneble, en ĉiuj grandaj urboj, iom post iom, konstruiĝos aeroplanejoj, kie la aviadistoj haltos, ĉu por provizi sin per petrolesenco, ĉu por riparigi la difektotajn partojn de iliaj flugmasinoj.

En ĉiu aeroplanejo devos do, necesege, troviĝi esperantistoj per plenumi rapide la dezirojn de la vojaĝantoj, por doni al ili ĉiujn necesajn informojn pri la daŭrigo de la vojaĝo, pri la danĝeroj de eblaj turnoventoj, kiujn ili bone konos, spertinte ilin multfoje dum iliaj regionaj aervojaĝoj.

Se aviadisto intencos aerflugi kun alia pasaĝero, li do, prefere, devos elekti esperantiston, kiu multe utilos al li por la vojaĝoj eksterlandaj. Jen nova okupo por varmegaj batalantoj de nia afero!!

Kiam ni vojaĝos aere, la aeroplanoj haltos ĉe difinitaj lokoj, kie devos ekzisti hoteloj speciale konstruitaj sur la haltejo mem de la aparatoj, ĉar se oni deziras daŭrigi la vojaĝon, estos de la sama loko, ke oni denove ekflugos.

Tiuj hoteloj, necesege, devos aparteni al komercistoj parolantaj Esperanton por altiri la vojaĝantojn el ĉiuj nacioj, kiuj ne plu timos la lingvan malsimilecon de la landoj, kiujn ili travojaĝos.

Sindikatoj de iniciativo estos kreataj preskaŭ ĉie, kie alteriĝos regule la flugmaŝinoj kaj necesege, Esperanto estos la lingvo la plej parolata kaj la plej ŝatata de la turistoj.

Nia tre grava Asocio U. E. A. povos multe utili en tiu rilato kaj mi eĉ konsilas al ĝi, ke ĝi okupiĝu, *de nun*, pri tiu punkto, kiu povus gajni multe da mono al la regionoj posedantaj bone organizitan sindikaton.

Ĉiam pli kaj pli, *ĉe ĉiuj nacioj*, multiĝos tiuj sindikatoj, kiuj dank' al Esperanto povos facile interkomuniki, unuj kun la aliaj, kaj instigi ĉiujn turistojn al pli longaj vojaĝoj pro la ĉiam kreskanta rapideco de la flugmaŝinoj kaj la ĉiea facileco de lingva komunikeco.

Ne kredu, ke mi trograndigis la rezultatojn de aviado, rilate niajn modernajn vojaĝajn kutimojn, mia konvinko jam de longe estas farita, ke, neeviteble, de la suprenvenko de l'aero, dependas la universaleco de nia kara lingvo Esperanto.

Ni esperantigu, do, kiel eble plej multe, la aviadistojn, *ĉe ĉiuj nacioj*, komprenigu al ili la tre gravajn profitojn, kiujn ili povos eltiri, por si mem, el la praktikado de nia

lingvo, kaj tuŝu ilian sekretan fierecon montrante al ili la mondajn progresojn, kiujn ili faciligos farigante niaj samideanoj.

Kredu min, karaj sambatalantoj, *neniam* Esperanto havis pli belan estontan sukceson ol nun, car, moderna elpensado de geniulo, ĝi devas marsi sur la sama vojo de l' sukceso kiel la modernaj geniaj venkoj de l' homo kontraŭ la naturo.

Henri de Coppet.



LABORO ⁽¹⁾

Laboro estas vivo mem, vivo estas konstanta laborado de la fortoj hemiaj kaj mehanikaj. De la unua ero, kiu ek-movigis por kuniĝi kun la apudaj eroj, la granda verko neces, kaj tiu kreado, kiu daŭras, kiu daŭros, ciam estas kvazaŭ la tasko mem de eterneco, universala verko, al kiu ni ĉiuj alportas nian stonon.

Ĉu universo ne estas grandega laborejo, en kiu oni neniam haltas, en kiu la malgrandaj eroj laboradas gigante, en kiu materio agadas, fabrikas, naskas senhalte, de la simplaj fermentoj ĝis la plej perfektaj kreitaĵoj?

Laboras la kampoj kovriĝantaj per rikoltoj, laboras la arbaroj dum sia malrapida kreskado, laboras la riveroj disfluantaj longe de la valo, laboras la maroj, kiam ili rulas siajn ondojn de unu kontinento ĝis la alia, laboras la planedoj kusenportataj de la ritmo, tra la ne-definitaj lokoj. Ekzistas nek estulo, nek aĵo povante malmovigi en mallaboro ;

(1) Tiu ĉi verko aperis en franca lingvo en la Bulletin de l' Association Emile Zola » (1910, n-ro 2).

KONTRAŬ
MAR-
MAL-
SANO

DELPHININE

KONTRAŬ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendangera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. 4 s.

Aĉetebla ĉe **S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris**
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

ĉiu, ĉio troviĝas kunportata al la tasko, devigata alporti sian parton al la komuna verko.

Pro tio, iu nelaboranto malaperas, estas forĵetata kiel neutila kaj ĝenanta, devas doni sian lokon al laboranto necesa, necesega.

Tiel estas la sola lego de la vivo, kiu nur fine estas la materio laborante, forto konstante vigla, la dio de ĉiuj religioj por la fina verko de feliĉo, kies necesegan bezonon ni portas interne de ni.

Kaj kia regulilo mirinda la laboro estas, kian ordon ĝi alportas ĉien ajn, kie ĝi regadas. Ĝi estas paco, gojo, same kiel sano; konfuza mi estas, kiam mi ĝin vidas humiligata, montrita simile al honto. Se ĝi min savis de certa morto, ĝi ankaŭ donis al mi ĉiun bonon, kiun mi posedas interne de mi. Ĝi rekreis al mi, sperton kaj noblecon, kaj kia mirinda ordigilo ĝi estas, kiel ĝi reguligas la povojn de la cerbo, la funkciadojn de la muskoloj, la rolon de ĉiu grupo, en aro de laborantoj. Sen alia helpo ĝi povus esti politika leĝaro, homara polico, sociala necesego. Ni nur naskas por homa abelujo; ĉiu el ni nur alportas sian unumomentan klopodon: la neceson de nia vivo ni nur povas klarigi per la bezono de la naturo, kiam ĝi postulas unu laboranton plie por la plenumo de sia verko. Ĉu malmodesta, ĉu malvera, iu alia klarigo estus! Niaj individuaj vivoj saĝnas oferotaj por la universala vivo de la mondoj estontaj.

Neniu feliĉo estas ebla, se ni ne enmiksas en ĝin tiun feliĉon solidaran de la eterna komuna laborado.

Kaj pro tio, mi dezirus, ke fine, estu fondota la religio de Laboro, la ununura Vereco, la Sano, la Gojo kaj Paco regonta.

El la verko « Travail » de Emile Zola tradukis

ROBERT BOLLACK.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

Moustiques ! Moustiques !! LE MOUSTIKOL

(Déposé)

Supprime **instantanément** les Démangeaisons occasionnées par les piqûres de **MOUSTIQUES, GUÊPES, PUNAISES, PUCES, etc.** — Le flacon : 1 fr. 50.

Vente en Gros : **PIOT & LEMOINE**, 117, rue Vieille-du-Temple, Paris.

Pharmacie des Deux Mondes

A. LÉGER, Pharmacien de 1^{re} classe

2, Rue des Tournelles - Bastille - Rue St-Antoine, 8

PRIX LES PLUS RÉDUITS

Livraison tous les jours dans PARIS et en BANLIEUE sans augmentation de prix. — Expéditions en PROVINCE.

Demander le **Catalogue** accompagné d'un petit manuel de *Médecine* et de *Pharmacie*, envoyé **gratis** et **franco** sur simple demande.

HYGIÈNE de l'INTESTIN




CONSTIPATION

Echantillons gratuits sur demande.

Refuser les contrefaçons comme on refuse la fausse monnaie.

Bien exiger la marque : **Chatel-Guyon Miraton, France.**



Médaille d'Argent

Médaille d'Or

Diplôme d'Honneur

FARINE LAVILLE

FLEUR D'AVOINE LACTÉE



« L'aliment d'avoine convient en tout temps, à tout âge, et à toute sorte de tempéraments. »

LÉMERY

Ancien Doyen de la Faculté de Paris.

La Boîte : fr. 1,50, dans toutes Pharmacies et Herboristeries.

Véritable
Sel Ferrugineux
assimilable

DÉCOUVERT PAR
M. Maurice ROBIN
en 1881.

LE
Fer Robin

est Souverain
CONTRE
l'ANÉMIE,
la CHLOROSE,
les HÉMORRHAGIES
DE TOUTE NATURE
Active la nutrition et
ne constipe jamais.

Chaque Flacon de ce
médicament dépourvu de
toute saveur, et qui se
prend à la dose de 10 à 30
gouttes par repas, dans un
peu d'eau ou de vin, repré-
sente une durée de trois
semaines à un mois de
traitement.

Pour éviter les Contrefaçons
EXIGER le
Nom de **ROBIN**

VENTE EN GROS :
18, Rue de Poissy, PARIS



Le Gérant : E. OLLIVIER.

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.